# Jura Semajno

**Semajna Bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio**

**Septembro: 1 2025**


Internacia Jurista Esperanto-Asocio rekomencas la dissendadon de sia bulteno al membroj kaj simpatiantoj de la jurista movado en Esperanto. Tamen, akorde al la Ĝenerala Reglamento pri Daten-Protektado de Eŭropa Unio, ni dissendos nian bultenon al tiuj interesitoj KONDIĈE ke ricevantoj akceptos per skriba mesaĝo tiun sendadon.

Do, se vi deziras daŭre ricevi nian bultenon bv. sendi mesaĝon al jena adreso jurista@esperanto.ac Kontraŭe, ni sendos al vi neniun plian numeron de *Jura Semajno*. Dankon!

## MALFONDITA LA EKLEZIO DE LA UNUIĜO EN JAPANIO



Tribunalo de la japana distrikto Tokio ordonis la malfondon de la Eklezio de la Unuiĝo, post peto prezentita de la Ministerio pri Edukado.

Oficiale nomita Federacio de Familioj por la Tutmondaj Paco kaj Unuiĝo, konata ankaŭ kiel *Moon-sekto*, pro la nomo de la fondinto, ĝi estis juĝe enketita post la murdo de la japana eks-ĉefministro Ŝinzo Abe.

La murdisto deklaris, ke li plenumis tiun murdon pro la fakto, ke lia patrino ruiniĝis pro sia aparteno al tiu Eklezio. La murdisto kulpis al partio de la eksa ĉef-ministro havi rilatojn kun tiu Eklezio. En la jaro 2023 la Ministerio pri Edukado petis la malfondon de la Eklezio de la Unuiĝo en Japanio, post akuzi ĝin uzi ne-lojalajn teknikojn por kapti monon kaj havaĵojn de la membroj.

Oni prezentis ĉe la tribunalo atestojn de preskaŭ 200 homoj kaj pli ol 5000 dokumentojn. En sia juĝo la tribunalo anoncis, ke oni nuligus la leĝan favoran statuson de tiu eklezio, atingita oficiale en Japanio dum la 60-aj jaroj, kvankam ties sidejo troviĝas en Koreio.

Do, ĝi perdos sian privilegion kiel eklezio kaj ankaŭ ĉiujn impostajn pag-esceptojn. Verŝajne tio provokos la neceson likvidi ĉiujn havaĵojn de la eklezio. Reprezentanto de la Moon-sekto asertis, ke la juĝo estas tute ne-akceptebla, do apelacio ĉe supera tribunalo estos baldaŭ prezentata.

# *Vorto de la Semajno*

**DEBITORO**: tiu, kiu ŝuldas sumon al aliulo.

*Sinonimo: Ŝuldanto,*

*Ekzemplo: Abundo da debitoroj ruinigis la kompanion.*



**Memoru, ke *JURA SEMAJNO* estas ĉiu-semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. Se vi deziras ricevi ĝin NEPRE, vi devos sendi ret-mesaĝon al: jurista@esperanto.ac**